# *Prezidanto de la reprezentant?ambro de Trinidado kaj Tobago akceptitas de Esteban Lazo*



**Foto: PL**

Havano, sep 4 (RHK) La prezidanto de la Nacia Asembleo de Popola Povo de Kubo (ANPP, Parlamento), Esteban Lazo Hernández akceptis  ?i-mardon la estron de la Reprezentant?ambro de Trinidado kaj Tobago, Bridgid Annisette-George, en oficiala vizito al la insulo.

En la Nacia Kapitolo, sidejo de la kuba parlamento, la prezidanto de la ?tata Konsilantaro de la Respubliko anka? bonvenigis la trinidadan delegacion kaj esprimis la deziron plifortigi la dulandajn rilatojn.

Pli fure, la prezidanto de la ?ambro de Reprezentantoj de la Respubliko de Trinidado kaj Tobago, deponis florkronon  oma?e al la Nacia Heroo José Martí, en la Memorialo, kiu eternigas la laboron de la Apostolo en la Placo de la Revolucio en Havano.

En la solena ceremonio ?i estis akompanata de Ana María Mari Machado, vicprezidanto de la Nacia Asembleo de Popola Povo kaj de la ?tata Konsilantaro; Cindy Shivani Maharaj, respondeca pri negocoj de Trinidado kaj Tobago en nia nacio; kaj Jesús Rafael Mora kaj Indira Pineda Rojas, direktoro kaj respondeculo de Internaciaj Rilatoj de la kuba le?dona periodo, respektive.

"Estas honoro kaj eksterordinara privilegio havi ?i tiun sperton", diris la estro de la Malsupra ?ambro de la Trinidada Parlamento subskribinte la vizitlibron ?e la Memorialo José Martí.
Bridgid Annisette-George alvenis en la Grandaj Antiloj la 1-an septembro por fari oficialan viziton, gvidante parlamentan delegacion. Dum sia restado en nia lando, ?i   interparolos kun aliaj a?toritatoj kaj vizitos lokojn de ekonomia, historia, scienca kaj kultura intereso; inter aliaj agadoj.

Fonto: ANPP

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/364329-prezidanto-de-la-reprezentantcambro-de-trinidado-kaj-tobago-akceptitas-de-esteban-lazo](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/364329-prezidanto-de-la-reprezentantcambro-de-trinidado-kaj-tobago-akceptitas-de-esteban-lazo)

**Radio Habana Cuba**